decidis akcepti membrojn ĝis la fino de 1986, kiuj estos kalkulitaj kiel fondaj membroj. Je la fino de 1986 la akademio havis tridek du fondajn membrojn.

Konstituiĝis la jena provizora estraro: Prezidanto: Paul Neergaard; Ĝenerala Sekretario: Christer Kiselman; Kasisto: Paul Kustaanheimo; Vicprezidantoj: Stojan Ĝuĝev kaj Ivo Lapenna; ceteraj membroj: Stanley Nisbet kaj Olav Reiersøl. La prezidanto okazigu elektojn de la estraro tuj post la 1-a de januaro 1987.

La plej grava tasko realigenda estis la publikigo de la *Aktoj de Akademio Comenius*.

**La unua estrarkunsido**

La provizora estraro kunsidis en Kopenhago 1986 09 20. Ĉeestis Paul Neergaard, Ivo Lapenna, Christer Kiselman, Paul Kustaanheimo kaj Stanley Nisbet. Oni decidis organizi elektojn por nova estraro por la trijara periodo 1987-1990. Oni decidis daŭrigi la laboron pri la *Aktoj*.

**Estraro 1987-1990**

Printempe de 1987 la estraro organizis elektojn por nova estraro. La limdato estis la 31-a de majo. La 11-an de junio 1987 la ricevitaj voĉdoniloj estis kalkulitaj en Upsalo de tri esperantistoj: Ingemar Kaj, Christer Kiselman kaj Wang Xiaoqin. Voĉdonis dudek membroj. Ĉiuj voĉdonis por la proponitaj kandidatoj, kaj tio signifas ke la estraro por la periodo konsistis el Paul Neergaard (prezidanto), Stojan Ĝuĝev kaj Ivo Lapenna (vicprezidantoj), Christer Kiselman (ĝenerala sekretario), Fabrizio Pennacchietti (kasisto), Stanley Nisbet kaj Olav Reiersøl.

**Morto de Neergaard kaj Lapenna**

Aŭtune de 1987 la akademio perdis siajn du iniciatintojn. Paul Neergaard mortis la 13-an de novembro kaj Ivo Lapenna la 15-an de decembro. Ambaŭ mortis en Kopenhago. Stojan Ĝuĝev, la alia vicprezidanto, fariĝis prezidanto.

**Aktoj de Akademio Comenius**

Paul Neergaard jam en 1986 komencis prepari la unuan publikaĵon de la Akademio Comenius. Li kontaktis Chen Yuan de la Ŝtata Lingva Komisiono